



Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

<http://www.mur.hnet.es/uphm/jesuo/k36.htm>

<http://www.dragonfire.net/~Esperanto/k36.htm>

Ĉu Varŝava aŭ Varsovio?

Ni ĥou!

**Propono pri
toksaj
drogoj**



**Por Hispanio kontraŭ la Reĝo!
Dio**

N° 36

Oktobro/Decembro 1997

Kajeroj



el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

Prezidanto: Martín Bustín Benito.
Apartado de Correos 4143
ES03080 ALICANTE

Vicprezidanto: María del Mar Guirao Gallego
Avdª Juan Carlos I, 22-8ª-H,
30800 LORCA (Murcia)
Hispanio.

Sekretario: José Pina Tuells,
c/ Stª Teresa, 22-2º CD,
ES30005 MURCIA

Kasisto: José María Bernabéu Franco
Gral. Primo de Rivera, 8
E-03360 Callosa de Segura,
ALICANTE (Hispanio).

Libroservo: Nicolás Gil Carballo,
Apartado 305
ES24080 LEÓN

Redaktoro: Jesuo de las Heras,
Apartado 4461
ES30080 MURCIA

Monsendo de kotizoj kaj abonoj al la
nova konto n° 1302 0412 86
0022655110 en libreta de Caja Postal.
Sen aldona kosto. La abono kostas 1000
pesetojn. Kvintancon oni ricevos.

Pretigas la Kajeron:
Provkorekto: José Pina Tuells,
Administro: Juan Antonio Cabezos
Martínez,

Redakto: Jesús de las Heras Jiménez.

Kovrilo: Ĉu la hispana esperantistaro jurasiĝis?

Enkonduko

Redaktore	3
Informoj de la Prezidanto	4
Pri amo	5
Kiel konkurenci la anglan.....	6
Por Hispanio kontraŭ la Reĝo!	7
Historiaj dokumentoj: Adiaŭ al IB-oj	8
La sociaj kondiĉoj de la eŭropa unuiĝo.....	10
KFD: Kutime Faritaj demandoj pri Esperanto.	12
Dio	14
Ni Ĥou!	15
Lingve parolante...Ĉu Varŝava aŭ Varsovio?.....	16
Toksaj drogoj — Proponoj	18
Mi lacas..., aŭ laciĝas..., aŭ laciĝas?	22
Tanaŭsuo	26
Impreso de kongresano	23
La tajforegno de Murcia,	27

Ni ne korespondas
pri nepetitaj artikoloj.
Tamen, ni klopodos
publikigi ĉiun artikolo-
lon kies enhavo estas
interesa kaj ne mis-
traktas iun ajn per-
sonon.

Pri la enhavo de
la artikoloj
respondecas la
aŭtoroj mem, ne la
redakcio.

Oni povas
reprodukti
artikolojn,
kondiĉe ke
oni citu la
originon.

Redaktore:

Nur anoj de *Kajeroj el la Sudo* rajtas nun ricevi la revuon, laŭ decido de nia lasta kunveno en Valensjo. Tamen, kelkaj elstaraj samideanoj daŭrige ricevos ĝin, kondiĉe ke ili reagos al nia sendado. Ankaŭ kelkaj esperantistoj kiuj ankoraŭ ne konas nin ricevos ĝin, sed ili bonvole diru al ni siajn komentojn pri la revuo kaj la asocio. Fari revuon kostas monon kaj oferojn, kaj ne ĝentilas, ke esperantistoj diras al ni, ke ili ne plu volas ricevi ĝin.

La venontan 14-an de novembro estus la 70-a datreveno de la naskiĝo de la majstro Narciso Yepes, kaj tiun tagon oni atingos pere de Internet la novan TTT-an paĝon dediĉitan al li kaj skribitan tute en Esperanto. Same kiel ĉe tiu paĝo pri Fernando Sor (<http://www.mur.hnet.es/uphm/jesuo/sor.htm>), la nova paĝo (<http://www.mur.hnet.es/uphm/jesuo/yepes.htm>) enhavos multe da sekvencitan muzikon, sed ĉi-tiukaze la tembro estos sole gitara. Alternativa adreso estas, ambaŭkaze, <http://www.dragonfire.net/~Esperanto/>, aldonante ĉu [yepes.htm](http://www.mur.hnet.es/uphm/jesuo/yepes.htm) ĉu [sor.htm](http://www.mur.hnet.es/uphm/jesuo/sor.htm).

Lastan jaron ni komentis la jaran kunveno de HEF, sed nun mi vidas, ke estas eraro: *Boletín* faru tion. Ni pritraktas la aferon nur flanken: tra la akto de nia propra kunsido de HALE, kaj ankaŭ per la artikolo kiun Lola Carmona ĝentile sendis al ni. Eble vi ne kunsentas tute kun ŝia opinio, sed tiukaze

vi havas niajn paĝojn por malkonsenti ĝin! Mi nur diras, ke mi dankas al ŝi pro ŝia nevolonta sugesto por koverto, kiun mi ne trovis ĝis la lasta momento! Ankaŭ mi mem verkis du artikolojn pri apartajn temojn pritraktitajn ĉe la kunveno de HEF, kaj ĉar preskaŭ ĉiu ano de la Hispana Federacio ankaŭ anas HALEn, mi klarigas mian sintenon pri demokrateco kaj pragmatismo ĉe ni. Nia prezidanto plendas pri la ĝenerala indiferenteco ĉe la esperanta laboristaro, dum Giordano Moya pritraktas la sociajn kondiĉojn de la eŭropa unuiĝo. La socian flankon ankoraŭ distilas la artikolo pri toksaj drogoj, verkita de José Pina, kaj Juan López enkondukas sian opinion en sia artikolo pri Dio. Ankaŭ estas manĝo por penso la bela rakonto de Alfonso, *Tanaŭsuo*. Esperanta kulturo inspiras la artikolojn pri *Kutime Faritaj Demandoj*, *Ni Ĥou!* kaj *Ĥu Varŝavo aŭ Varsovio?*

Finfine, estas historie dokumentaj artikoloj tiuj de Luis Serrano Pérez pri la *Internaciaj Brigadoj* kaj la recenzo de Olga López pri la libro de Blasco Ibáñez, *Por Hispanio kontraŭ la Reĝo*.

Mi esperas, ke vi ĉiuj ĝuu la kajeron, kaj ke venigos vian opinion sufiĉe rapide por enhavigi per ĝi la venontan numeron.

Amike kaj legeme mi salutas vin.



Informoj de la prezidanto



Malgraŭ la ŝajna stagnado de la laborista Esperanto movado du novaj LEA-oj kreiĝis.

Niaj italaj kaj rusaj kamaradoj sukcesis, malgraŭ diversaj malfacilaĵoj, starigi LEA-ojn kiuj atestas pri ia revigliĝo de la esperanta laboristaro.

Same kiel la aliaj laboristaj organizaĵoj, la esperanta laborista movado suferas ĝeneralan indiferenteco de la plej multaj laboristoj, kaj apation ene de la LEA-oj mem. Novaj junaj fortoj estas necesaj por revigligi nian agadon, kaj plenumi la celojn fiksitajn al niaj LEA-oj. Unu el tiuj celoj, laŭ la Statuto de SAT, estas *Utiligi praktike la internacian lingvon ESPERANTO por la klasaj celoj de la Laboristaro tutmonda*. La ekspluatado de la homoj daŭras, kaj fariĝas pli, kaj pli kruela por la laboristoj kiuj perdas sian vivrimedon anstataŭgite de modernaj produktaj sistemoj kiuj kondamnas ilin al mizero. Ĝis kiam la laboristoj eltenos tiun-ĉi situacion? Se la distribuo de la kreitaj riĉaĵoj ne fariĝas pli justa okazos dramaj sociaj eventoj, ĉar la limoj de malriĉeco, kaj sencela vivo estos atingitaj.

Kamaradece salutas vin

Marteno.

La referendumo kiu neniam devas okazi

Antaŭ du jaroj mi kunvenis en Mursjo en la Jara Kunsido de HEF, kaj multe miris min, la vortoj de la Prezidanto Alonso, kiam li petis voĉdonon pri demisio de la Asembleo Ĝenerala kiel supera organo de la Hispana Esperanto Asocio. La propono diris, ke por aferoj konsidere gravaj, anstataŭ decidi la asembleo mem, oni starigu referendumon poŝte, por ke la neĉeestantaj membroj de HEF ankaŭ povu decidi. Miregis min, ke ni ĉiuj, unuanime konsentis pri tio. Kies kulpo estis? Ĉu manko da sperto en nia lingvo, kaj sekve nekompreneo de tio, kion la Prezidanto proponis? Ĉu malintereso pri niaj aferoj?

Mi ĉiam konsideris, ke la Asembleo Ĝenerala estas la natura placo —kiel ĉe la Malnova Grekio, kie demokratio estis inventita—, kie oni povas diskuti kaj rezoni antaŭ ĉiuj ajn, kaj finfine atingi validajn decidojn inter ni ĉiuj la ĉeestantoj. Tiuj, kiuj ne povas ĉeesti niajn kunvenojn perdas ja gravan privilegion. Mi elspezas sufiĉe kvanto da mono kaj havas problemojn por ĉeesti la kongreson, sed mi iras. Multaj samideanoj ne povas veni, kaj aliaj ne volas veni, aŭ ne penas veni. Mi opinias, ke estas demagogio defendi la *rajton ne veni* kaj tamen baloti. Ĉar ni ĉeestantoj povas konvinki, aŭ esti konvinkitaj, ni povas ĉiukaze diri niajn pensojn, kaj venki aŭ malvenki la baloton, kaj —se ni estas demokrataj vere— ni devas akcepti ties rezulton.

Mi opinias, ke tion farante, la eks-Prezidanto de HEF postulis grandan

fidon el la anaro. Ĉar referendumo bezonas antaŭan informadon, kaj tiu informado devas esti farata de la estraro, kompreneble. Kaj tio signifas manko de kontraŭa argumentado al tiu de la estraro! Tio estas: adiaŭ al la demokratio ene de HEF kaj saluton al burokratestrismo.

Honoras la reston de la tiama estraro, ke ili kontraŭis tion, deklarante per informo pri estrarkunveno je la numero 328-a de *Boletín*, ke tiu decido, malgraŭ asemblea, estis kontraŭstatuta pro la maniero en kiu oni faris ĝin (malkadre de eksterordinara asembleo) kaj sekve ne validas. Mi kredas, ke tio estas sufiĉe grava kaj ankaŭ malfacila decido, kaj pro tio mi volas publike gratuli al la tiama estraro, kies plejmulton enhavas la nuna estraro de HEF.

Mi ne volas fini mian artikolon sen danki al Prezidanto Alonso pri sia sindediĉo por Esperanto dum OK longaj jaroj, kaj esperas, ke li sukcese daŭrigu sian agadon tiucele. Ankaŭ, salutendas oni al la nova estraro de HEF, al kiu mi deziras kore pli viglan agadon, kun helpo de ni ĉiuj.

La Redakcio

Pri amo

Amo, ne sakra aŭ profana, estas nur amo.

Sekso ankaŭ estas amo. Sekso povas esti nur aŭ perforta aŭ ama. Se amo estas efemera, oni taksas ĝin malbonaĵo bedaŭrinda... Pli validas kvin minuta seksa intersamĝo ol dumviva sklaveco al neamato.

Marina.

Kiel konkurenci la anglan...

Dum la pasinta kunveno de HEF en Valensjo oni diris, ke la prezon de la kurso de Esperanto perkoresponda instruita de Hispana Esperanto Federacio oni devas malplialtigi, ĉar junaj interesitoj pri la afero malkuraĝiĝas antaŭ la prezo, ĉirkaŭ 15.000 pesetoj. Oni kontraŭargumentis dirante, ke junuloj ofte pagas multe pli por angla kurso, kio ja estas vera. Sed


tio ne estas la tuta vero: ne junuloj, sed gepatroj pagas la kursojn. Dum hodiaŭaj gepatroj kredas, ke la anglan oni bezonas por ĉio, preskaŭ neniu scias por kio Esperanto utilas. Jes, certe Esperanto estas ilo por interkompreniĝo kaj helpas fari la mondon pli bona kaj pli ĝusta, sed *nun* ĝi ne helpas siajn gefilojn gajni vivon, kaj revo kaj persona bezono ne similas!

Tial, 75 000, eĉ 750 000 pesetojn, oni volonte pagas, se tio ebligas la filon paroli la anglan *kiel anglo*. Domaĝe, tion tre malofte oni atingas, kaj kutime la afero pri angla kurso iĝas fraŭdo. Eĉ pli domaĝe, gepatroj (kaj ankaŭ gejunuloj) kredas, ke tio estas la sola kulpo de la studanto. La rezulto estas fiasko kaj seniluziigo al fremdaj lingvoj. Tio estas simpla, logika procezo kiu sekvas el nerekonita taŭtologio: nur angloj povas esti angloj. Ne ĉar oni devas havi rasajn kondiĉojn por regi la anglan (multaj alirasanoj bone regas la anglan), sed ĉar oni devas praktiki la anglan dum multaj *miloj* da horoj por regi tiun senkoheran lingvon.

Aliflanke, kvankam ni scias, ke post deko da horoj studante Esperanton oni sukcesas kompreni similajn studantojn de iu ajn parto el la mondo, tion oni mem devas sperti

por agnoski. Nei tion estas nei la kialon de la streboj de la Esperanta Movado Jarcenta, se ne la strebon mem. Se ni havas multekostan kurson de Esperanto, ĝermanta intereso por nia lingvo mortos pro mona rezono.

Nia atlernejoj hispanaj ofte elspezas milojn da pesetoj pri biero, kino kaj kafo, semajne; sed se oni petas ilin aĉeti libron (eĉ pri la angla), kiu kostas 700 pesetojn, ili rifuzos, dirante



ke *ĝi multe kostas!* Solvo estas ofte *devigi* ilin aĉeti la libron, sed ankoraŭ estas alia solvo: disdoni fotokopiojn kun la koncernaj tekstoj studendaj: tiu dua metodo pli bone funkcias, kompreneble. Gelernantoj ne plendas, ke la profesoro volas mense veneni aŭ sektigi ilin, kvankam tiuj temoj kostas malmulte, aŭ nenion!

Lernigi Esperanton ne ankoraŭ povas esti komerca entrepreno, kaj se oni starigas tion, nur fiasko atendas nin. Lernigi Esperanton ankoraŭ estas filantropa agado, kaj sekve devas kosti nenion, aŭ plej malmulte kiel eble, al lernanto. Bedaŭrinde, ĝi estas la sola praktika vojo, ĉar ankoraŭ ni vivas *katakombeskajn tempojn* de Esperanto. Malbonskevaĵo de tio estas, ke oni povas taksi nin kiel religian sekton, aŭ alion eĉ pli malbonan. Tio ne gravas. Sed se Esperanto devas pluviivi nian tempon, oni devas pliigi la nombron de parolantoj de Esperanto, kiel la nova estraro de HEF programis.

Sed tiu *filantropia* flanko de nia lernigado ne signifas *amatora*: nia instruado estu profesinivela kvankam filantropa. Mi iam legis, ke oni diris, ke Zamenhof estis amatoristo, sed tio estas, laŭ mi, nur ignoro: Zamenhof, same kiel Fernando de Saussure, estis la unua fakisto de nova fako: se Fernando de Saussure kreis lingvistikon, Zamenhof kreis interlingvistikon,

kio ne povas esti komprenita el sola lingvo, se ĝi ne estas interlingvo, kiel Esperanto. Sed multaj instruistoj de Esperanto estas tute ne profesiaj, certe, kaj ili eĉ ne havas kelkfoje taŭgan nivelon de la lingvo instruata. Tamen, ili estas la plej bonaj instruistoj, kiujn ni havas. Sekve, mi ne kritikis ilin: mi nur petas, ke oni faciligu ilian agadon. Necesa agado, ĉar Esperanto staras sur ili. Tial en niaj kongresoj devas esti apartaj kursoj senpagaj por profesoroj de Esperanto.

Por allogi novajn parolantojn de Esperanto oni devas unue esperantistigi ilin. Se la procezo ne kostas monon al ili, ili konsentos. *Amnesty International* disdonas broŝurojn senpagajn pri siaj celoj kaj atingoj, kaj ankaŭ petas volontan laboron. Ni povas fari same: ni donacu kurson de Esperanto, kaj poste ni petu, ke ili lernigu Esperanton. Kelkfoje miaj kursanoj demandas al mi: *se la kurso estas senpaga, kial vi instruas ĝin?* Mi kutime respondas: *pago estas, ke vi iam instruos alian senpagan kurson, se vi kredas, ke ĝi indas.*

Fine, mi diskutos kiel ni ne povas konkurenci la anglan: mankas al ni monon por publikii nian lingvon televide, radie aŭ ĵurnale. En eta provinca ĵurnalo averti Esperanton kostas 70 000 pesetojn per malgranda anonco. Ankoraŭ Esperanto ne estas mona investo. Mankas ankaŭ ŝtata apogo: kiam ni petas enhavigi studplanon per nia lingvo, oni ridindigas nin kaj la lingvon. Mankas ankaŭ sendependa prestiĝa institucio, kiel BBC, aŭ fama eldonejo kiel Hachette. Mankas, unuvorte, *kredemeco* fare de popolo komuna. Sed, iom post iom, ni konvinkas nian najbaron, nian kunmetiiston, nian kunvojaĝanton, nian kunfamilianon, eĉ nian amikon..., pri la plibono de Esperanto. Iom post iom ni disvastigas nian ideon kaj instruadon. Pri la lingvo, pri la bezono, pri la realo de la instruado de fremdaj lingvoj. Iom post iom la mondo internaciĝas. Iom post iom ni sukcesos. Kiam fina sukceso venos, ni ne plu estos esperantistoj: ni nur estos komencintoj.

Jesuo de las Heras, Mursjo.

Por Hispanio kontraŭ la Reĝo!

Don Vicente Blasco Ibáñez



rangas inter la plej bonaj verkistoj de la hispana lingvo, kaj li eble estis la plej inteligenta de sia tempo, kaj la plej brava el ili,

tial ke mi diros tuj poste. Se vi ĉecestis la lastan Hispanan Kongreson, vi memoras, ke la kongresejo estis ĉe Avenuo Blasco Ibáñez. Li fotis sian Valensjon per siaj libroj ĉarmaj *La barako*, *Rizo kaj tartano*, *Inter oranĝarboj* kaj aliaj. Li ankaŭ verkis aliajn gravajn kaj bizarajn librojn kiel *Turno al la mondo de novelisto*, kaj *La kvar rajdantoj de Apokalipso*, kaj ankaŭ multajn aliajn verkojn. Pro sia altkvalita literara agado, li ricevis la honordoktoriĝo de la Universitato de Vaŝingtono en 1920. Don Vicente riĉiĝis danke al sia plumo, kaj li loĝis en Francio parton de sia vivo.

Dum li vivis en Parizo, li verkis panfleton titolitan *Por Hispanio kontraŭ la Reĝo* al kiu sekvis *La novelisto kaj la Reĝo* kaj *Kiel estos la Hispana Respubliko*.

Se vi defendas monarĥion, se vi gratulas vin, ke vi vivas en monarĥa lando, se vi trovas aristokration inda, se vi ne estas monarĥdefendanto, sed ne ĝenas al vi, ke vi vivas en monarĥlando, eble indas, ke vi legas la libron de S-ro Blasco Ibáñez.

Dairiĝas en paĝo 11-a

Historiaj dokumentoj

La adiaŭo al la Internaciaj Brigadoj en Barcelono. Oktobron 1938.

Al la adiaŭoj de la volontuloj por la libero alvenis grandega homamaso, deziranta esprimi al ĉi tiuj heroaj batalintoj sian intiman korinklinon kaj eternan dankemon.

La 13-an de Oktobro de 1938 la Nacia Komitato de la Popola Fronto publike diskonigis la jenan dokumenton:

Nia Hispanio adiaŭas emociiĝinta la volontulojn internaciajn, kiuj tiom kontribuis ĝin defendi.

Hispanio ilin adiaŭas kun senfina dankemo kaj profunda frateca sento. Civitanoj de nia patrio, pro la sindono kaj la heroismo, kiujn ili prodigis por ĝi, ili lasas en ĉiu hispana koro la rememoron, kiu neniam estingiĝos.

En la intenseco de la lukto kaj la laboro, per kiuj ni daŭriĝos defendante nian sendependon, la veraj hispanoj ĉiam havos la ekzemplon de braveco kaj sindonado, kiujn donis al ni ĉi tiuj aŭtentikaj volontuloj, tiel ni fariĝos meritaj je ties digneco.

Internaciistoj venis en Hispanujon kiam la ŝajna intercivitana milito sin montris kiel invado-milito. Venintaj el la plej diversaj landoj de ĉiuj kontinentoj, ili alvenis per sia propra deziro. Iuj forkurintaj de siaj propraj landoj, en kiuj regis la teroro, homoj de diversaj religioj kaj politikaj partioj, homoj ankaŭ sen religio kaj sen partio, ilin kunligis la sama sento. Ili venis por oferi siajn vivojn

—kiun multaj lasis por ĉiam en niaj teroj— por la vivigo de la fronto de la kontraŭfaŝismo en la mondo.



*En la bataloj pli kruelaj de nia milito, en Madrid, Jarama, Guadalajara, Teruel, Brunete, Aragón kaj Ebro, ili batalis niaflanke, kun la avangardoj de la Popola Armeo. Kaj kiam ekde la montopintoj de **Montaro Pandols** kaj Montaro Caballs la volontuloj daŭre defendis la pacon kaj la civilizacion, la Respubliko, pli forta kaj milite pli kapabla, devas peti al ili la oferon plej dolorigan: eliri de*

Hispanujo por faciligi la venkon kontraŭ la faŝismo.

Tiuj, kiuj ĝis hodiaŭ per sia fusilo defendis nin, ili ŝanĝos la fronton. En siaj respektivaj landoj, iuj, en tiuj popoloj en kiuj ili sin distribuos, ili fariĝos ambasatoroj de nia lukto, sciigante, ke la nomo de Hispanio — kies union ili tiom bone konis— oni uzu por unuigi ĉiujn kontraŭfaŝistojn el la mondo en ne halteblan movadon por la solidareco kaj helpemo.

Kiel omaĝon al la heroaj volontuloj de la libero, la ĉefo de la Registaro D-ro Negrín, subskribis la 20-an de oktobro de 1938 ordonon de la Ministerio por la Nacia Defendo per kiu oni kreis la MEDALON DE LA INTERNACIAJ BRIGADOJ:

Rajtos kunporti ĉi tiun ordenon ĉiuj batalantoj ne hispanoj kiuj estis membroj de la Internaciaj Brigadoj, ekde ilia starigo ĝis la dato de ĉi tiu cirkulero.

Dum postaj tagoj, kaj okaze de iu el la aranĝoj por la adiaŭo de la brigadistoj, en kiu troviĝis reprezentantoj el pli ol 50 landoj, la ĉefo de la Registaro anoncis:

La Registaro de la Respubliko rekonas kaj jam rekonas la internaciistojn, kiuj tiom kuraĝe luktadis kun ni, kiel samlandanoj niaj, kun la rajto postuli, finiĝinta jam la milito, la HISPANAN CIVITANECON.

La oficiala adiaŭo de la Registaro de la Respubliko al la internaciistoj volontuloj okazis en la Kazino de la Rabassada (Barselono) la 27-an de oktobro de 1938. En la salonoj, ornamitaj per naciaj flagoj kaj afiŝoj, sur kiuj estis legeblaj:

Hispanio ĉiam estos via patrio. Kaj la hispanoj viaj fratoj!

Negrín esprimis, nome de la registaro kaj de la hispana popolo, la dankemon kaj korinklinon al la elstaraj patriotoj el 54 landoj, kiuj volonte alvenis al Hispanio por batali kontraŭ la barbara faŝismo. Negrín ekzaltis la mirindan ekzemplon de tiuj miloj da volontuloj, kiuj oferis sian vivon en hispana tero. Ilia memoro —li diris— vivados kun ni en la historio de Hispanio, kiu en ĉi tiuj momentoj reprezentas la historion de la mondo.

Estus vane, —li aldonis— estus nedigne, ke la popolo kaj registaro volus danki tiom grandan montron de sinofero pere de materia dankemo, sed..., la Registaro deziras, ke iumaniere restadu kun ili la rememoro materia, kaj pro tio oni instituciigis la medalon, kiun ni honore transdonas al vi, kaj ni havas la certecon ke vi, internaciistoj, pro ĝia signifo sentos vin honorigitaj ĝin kunporti. Pro tio la hispana Registaro samatempe enmanigas la rajtigilon, kiel kunbatalanto kaj ankaŭ la rajto postuli vian hispanan naciecon, en la morgaŭo.

Nome la internaciistoj parolis subkolonelo Hans (germano), eksĉefo de la 45-a divizio, la komisaro inspektoro de la Brigadoj, Luigo Longo (italo), unu el la organizintoj de la Internaciaj Brigadoj, la franca deputito de la Franca Parlamento, André Marty. Luigo Longo diris:

Ĉi tie estas kuniĝintaj la plej bonaj filoj de 54 landoj. Ĉiuj venis libere, evitante enormajn obstaklojn por trairi la landlimojn: multaj el ili devis eskapi de la faŝistaj karceroj por preni la armilojn en la lukto por la libero. Kaj ĉi tie estas homoj de ĉiuj sociaj tavoloj: laboristoj el Parizo, Londono, Nova Jorko, Berlino, Vieno, Torino kaj de la Balkanoj: homoj el Azio kaj Afriko, kamparuloj el Hungarujo, Jugoslavio, Italio, reprezentantoj de la sciencoj, la artoj, de la literaturo. Nin ĉiujn adiaŭas hodiaŭ la Registaro de la Respubliko kaj la Popola Armeo, kiun ni vidis naskiĝi, kreski kaj fortiĝi. Ni lasas la belan teron hispanan, al kiu ni tiom lernis ĝin ami. Kaj baldaŭ ni disiĝos por trairi aliajn landojn. Malfeliĉe al ĉi tiu festo ne venas, ĉar ili ne plu revenos kun ni, multaj kamaradoj, kiuj venis al Hispanio, niaj plej bonaj homoj estas tiuj, kiuj restas ĉi tie sub la hispana tero.

La 28-n de oktobro la barselona popolo dediĉis impresigan omaĝon kun la ĉcesto de pli ol 250.000 personoj, kuniĝintaj laŭ longe de la Avenuo Dekokvara de Aprilo (nuna *Djagonal'*) paradisi internaciaj brigadistoj fanditaj kun reprezentantoj el ĉiuj la militaj disciplinoj de la Popola Armeo, inter ĉirkaŭbrakoj, floroj kaj larmoj de emociiĝinta homamaso. Organizaĵoj: Partioj kaj sindikatoj: PC, PSOE, PSUC, JSU, UGT, CNT, FAI, respublikanoj kaj multaj aliaj.

(Daŭrigota)

Luis Serrano Pérez



La sociaj kondiĉoj de la eŭropa unuiĝo

de Giordano Moya Escayola

La sociaj ideoj klasaj naskiĝis en la mezo de la pasinta deknaŭa jarcento. Ili alvenis post la Franca Revolucio, ĉar estante nur politika ĝi ne zorgis pri la socia aspekto de la socio. La politikan liberecon sekvis la prospero de sovaĝa kapitalismo kun la rezulto, unuflanke de la riĉiĝo de malplimulto kaj aliflanke de la mizero de la pli multo, precipe manlaboristoj. Aperis la ideologioj de la klasbatalo en du skoloj, la historia materialismo kaj la liberecana. La socia lukto estis drasta, sed fine venkis la kapitalismo. Tamen, la nuntempa kapitalismo ne estas tiel same sovaĝa kiel en la deknaŭa jarcento. Nuntempe ekzistas la socia askuro, la vivnivelo altiĝis, la pli multo posedas aŭtomobilojn, fakte la plej multnombra klaso estas la mezklaso. La nuntempaj proletoj estas la marĝenuloj, la sendungitoj kaj la gastlaboristoj. Ili estas la veraj proletoj, kvankam malpli multo, tendencas al kreskado kune kun la nesekureco de la laborposteno en la neŝtataj entreprenoj. Estas risko de revivigo de la sovaĝa kapitalismo. Kion fari?

La tradicia laborista batalado restas neefika. Se iuj sindikatoj atingas altiĝi la salajrojn, tio respuguliĝas en la altiĝo de la varoj koste de la aliaj, kiuj ankoraŭ ne havas pli altan salajron. Se la

salajruloj dependas de la ŝtato, la ŝtato aŭ altigas la impostojn aŭ la prezon de la servoj aŭ ambaŭ kune. Fine, kiam ĉiuj ricevas pli altajn salajrojn, la ŝtato malaltiĝas la valoron de la mono kaj ĉio restas kiel antaŭe krom plialtiĝo de la inflacio. Sensenca lukto.

Nuntempe Eŭropo ekonomie unuiĝas. Se estos stablita nur unu mona unuo, la kutima rimedo de la registaroj malaltiĝi la valoron de sia monunuo aŭ kontraŭiĝi la altiĝon de la salajroj jam ne estos ebla, ĉar la monunuo estos la sama por ĉiuj ŝtatoj. Tial la altiĝo de salajroj estos respugulata je la altiĝo de la prezo de la varoj en tiu ŝtato. En komuna merkato tiuj varoj perdos aĉetantojn, pliĝos la maldungado kaj en la aliaj, kiuj ne altigas la salajrojn estos pli da laborlokoj. La naciaj sindikatoj restos tute senpovaj, taŭgos por nenio.

Se la eŭropa kapitalismo unuiĝas, kion faru la laboristoj rilate tiun okazaĵon? Ankoraŭ ne estas stablitaj paralelaj eŭropaj sindikatoj. La laboristoj restas nacie pensantaj. Tio reflektiĝas en nia esperantiata movado. La laboristoj ordinare ne lernas Esperanton, okaze la anglan. Se devos esti fondataj eŭropaj sindikatoj, ili bezonos la lingvon Esperanton. Tamen la plejmulto el la laboristoj montriĝis surdaj al la esperantista alvoko. La mensa rutino havas sian koston, esti la suferantoj kaj ne la

impulsantoj de la socia kaj historia disvolviĝoj.

Certe, la eŭropa unuiĝo estas portata de la kapitalismo, kaj ne de la laboristoj. La sociologiaj ideologoj de la deknaŭa jarcento ne prognozis la nunan konsumeman socion, ili pensis laŭ la siatempaj kondiĉoj, neantaŭvidante la malproksiman estontecon. Juljo Verne mem ne prognozis la atomenerĝion. Preskaŭ neniu antaŭvidis la nuntempan planedumiĝon. Kontraŭe al la materiisma skolo, kiu deduktas, ke la materiaj kondiĉoj respreguliĝas en la pensmaniero, okazas tute kontraŭe la penso influas la materiajn kondiĉojn de vivo.

Ĉu reagi kontraŭ la eŭropa unuiĝo? Se la eŭropa unuiĝo malsukcesus, la eŭropa kapitalismo povus ruiniĝi, sed tiu ruiniĝo ankaŭ pezos sur la laboristoj. La bonfarta socio povus ankaŭ malaperi.

Kiel plej gravaj nuntempaj sociaj problemoj estas la eventualeco de laborlokoj, la sendungeco, la plinombriĝo de la marĝenuloj kaj la integriĝo de la ekstereŭropaj gastlaboristoj, kiuj estas la veraj proletoj.

La laborista klaso devas renovigi sian jam tradician penson. Tiu ne taŭgas por aranĝi la nunajn sociajn problemojn. Eble la socia direkto de la laboristoj devas iri al la kunlaborado ĉe la entreprenoj. La ordinara anonima societo kapitalisma povas fariĝi konzerno laborista-kapitalista, en kiu la laboristoj kolektive zorgos pri la laboro kaj ricevu salajron kaj la kapitalistoj interezojn kaj estu dispartiĝo de la profito laŭleĝa fondiĝa kontrakto. La socia asekureco ankaŭ devas ampleksiĝi.

Ĉe la sojlo al la dudek unua jarcento tiu socia direkto ŝajnas la plej atingeblaj en evoluado al ekonomia demokratio.

Junio 1997.
Giordano Moya.

Venas el paĝo 7-a

La libro temas pri Alfonso XIII,

la avo de la nuna reĝo de Hispanio. Tri aferoj de sia reĝado ege ŝokas nin: tia hispana neŭtralecon dum la Unua Monda Milito, la Milito de Afriko, kaj la Diktatoreco de Primo de Ribera.



Alfonso XIII

Pri la unua, Blasco Ibáñez denuncas, ke dum la hispana popolo estis neŭtrala, la Reĝo helpis la kajseran armeon per sekreta bazo apud Tortosa, kie la Ebro rivero mortas. Germanoj uzis submarinojn por detruji francajn kaj anglajn ŝipojn ene de hispanaj maroj, mortigante eĉ virinojn kaj infanojn. Pri la dua, li denuncas, ke en Algeciras

la Reĝo akceptis el Francio marokan arcon nomitan *El Rif*, kiun nek la francoj nek la sultanoj de Maroko iam sukcesis konkeri. La Reĝo sendis cent mil soldatojn por batali nur ok aŭ dek mil montaranojn, sed eĉ tiel, tiuj-ĉi venkis. Generalo Silvestre lanĉis atakon en 1921 laŭ ordo de la Reĝo mem, sensciante ĝin la Ĉefgeneralo de Hispana Afriko, Generalo Berenger. Dek du mil hispanaj soldatoj mortis en kion oni konas nur kiel *El desastre de Annual* (la malsukceso de Anŭal). Ĉirkaŭ 30.000 hispanaj soldatoj mortis en tiu sensenca milito, kiun ili malvenkis.

Ĉar la Reĝo ne povis manipuli la demokrate elektitan registaron de la Parlamenta Monarĥio, li

Dairriqas en paĝo 13-a

Debatindaĵoj:

KFD: Kutime Faritaj demandoj pri Esperanto.

17. Kiuj estas la malamikoj de Esperanto?

Ili troviĝas unue en la anglaparolantaj landoj, kaj plej ekzakte ĉe ties registaroj. Kial? Ĉar tiom longe, ke la angla estas la *plej grava* lingvo el la mondo, oni vendas pli da filmoj, noveloj kaj aliaj faritaĵojn (kaj *subfaritaĵoj*) el usonangla kulturo. Kaj tio signifas multe da mono, kaj sekve da povo.

Due, la gento aŭ elito de personoj kiuj regas la anglan en ĉiu lando kaj pro tio agas kiel ponto inter ĝeneralaj personoj, kiuj ne scipovas la anglan, kaj faritaĵoj kaj personoj el angla landaro. Oni scias, ke humilaj agrikulturistoj vendas frukton de sia laboro dudek (aŭ pli) fojojn pli malmultekoste ol ĝia merkata prezo; estante la diferenca mono por la komisiisto. Ĉe la merkato lingva kaj kultura okazas same, kvankam la *komisiistoj* oni nomas *eliton*. Tiu gento kulturata la anglan kiel varon, kaj sendas siajn geinfanojn en Anglion aŭ Usonon por studi; kaj ili ne volas perdi sian negocon. Ili kutime sidas je gravaj lokoj en societo, kaj siaj postenoj ĉefe estas tiuj kiuj *kreas opinion* (editorialoj, radio-stacioj aŭ televido-stacioj, ĵurnaloj, lernejoj). Unu el la duon-mensogoj, kiujn ili periode disvastigas, estas ke *ĉiuj studas la anglan*. Kion ili ne mencias estas kiom da ili LERNAS ĝin.

Sed la ĉefa malamiko de Esperanto estas IGNORO kaj manko da repenso fare de la ĝenerala publiko. Oni diras al ili, ke Esperanto estas artefarita idiomo

(insistante pri la trajto de *artefarita* kiel io malbonodora, por poste bonparoli pri kino, aŭtomobilo kaj aliaj artefaritaĵoj, uzante duoblan lingvon malhonestan), kiu estis bona ideo, sed kiu malsukcesis. Kaj se ĝi malsukcesis antaŭ jarcento..., kial oni ankoraŭ insistas pri ĝi? Malsukcesis Novial, Volapük, Interlingua, Basic English kaj multaj aliaj, kaj neniu parolas iun ajn el ili. Kial oni ankoraŭ parolas pri Esperanto? Ĉu eble estas, ĉar malveras, ke Esperanto malsukcesis? Ne, gesinjoroj: ĝi tute ne malsukcesis. Kaj ĝi neniam malsukcesos dum restos personoj kiuj volas interkompreni sin.

La ĵus menciita rezono estas ekster la kapo de multe da personoj, sed ili tamen englutas tiujn *oficialajn verojn* diritajn de *sciuloj*, kiuj siavice neniam penis kontroli ilin. Tiu ignoro pri Esperanto kaj tio, kion ĝi reprezentas (planeda komunikado tuja sur la bazo de la popolaro, inter la ne-fakistoj, la bazaj civitanoj de ĉiuj kulturoj) estas ege promociita de ĉiuj politikistoj niatempaj en ĉiu landoj (escepte de la Itala Radikala Partio). Post ĉio, se la baza civitanaro de la mondo estus pli kritika kaj realimaj anstataŭ tiom televidbinditaj, ili ne estus tie, kie ili estas...

18. Se la malamikoj de Esperanto estas tiom povaj kaj malfaciligas la aferon tiel por ĝi..., kial zorgi pri lingvo kiun oni neniam adoptos tra la tuta mondo?

Ni esperantistoj ne zorgas pri Esperanto aŭ sia futuro. Kion ni timas estas malkomprenemo ekzistanta en nia mondo inter homoj el malsimilaj kulturoj. Se ne estas bezono de kompreno, Esperanto devas malaperi: tio estas nur logiko. Sed se estas personoj kiuj volas rakonti aferojn, ekamikiĝi kaj serĉi reciprokan helpon super artefaritaj limoj starigitaj de *naturaj lingvoj*, tiam Esperanto ankoraŭ estas necesa. La povo de malamikoj de Esperanto estas ega, kaj nia agado estas tre malfacila, tio veras, sed tiu povo ne estas ĉiopova kaj havas fendetojn tra kiuj bonvolo al aliulo povas pasi, kaj tio sufiĉas por ke Esperanto daŭrigu sian ekzistadon kaj penu doni feliĉon al multe da homoj.

Certe Esperanton ne ankoraŭ adoptis ĉiu personoj el la mondo, sed oni jam adoptis ĝin EN TUTAJ LANDOJ el la mondo. Kaj tiu malmulta kaj selekta aro uzante ĝin povas montri kia estas la kulturo reprezentita de parolantoj de Esperanto. Internaciaj rilatoj estas ĉiam riĉigitaj, sed ili ankoraŭ pli estas tiaj kiam ili ne estas filtritaj laŭ mensogoj oficialaj de ministroj, ĵurnalistoj kaj aliaj viktimoj de la *Simptomaro de Babelo*, kiel ankaŭ estas turistoj kiuj vizitis aliajn landojn regante nur tiun *anglan de hotelo kaj flughaveno*. Ŝtonoj, kvankam famaj, restas nur ŝtonoj en Germanio, Japanio aŭ Hispanio. Sed hispano malsimilas multe pli al germano aŭ japano. Kaj kiam tri uloj povas interparoli pri filozofio, politiko, literaturo aŭ popola kanto sen vortaro aŭ interpreto, ne estas dubo: ili parolas en Esperanto. Tial oni profitas lingvon kiu funkcias, kvankam NE ĈIUJ ankoraŭ adoptis... }:-)

19 Mi lernus ĝin, sed se surstrata personoj ne parolas ĝin ie en la mondo, kiel ĝi utilis al mi?

John F. Kennedy diris iam: *It's not what your country can do for you, it is what you can do for your country* (ne temas kio via lando povas fari por vi, temas kio vi povas fari por via lando). Homoj kiu lernas Esperanton kutime solidaras la tutan homaron, kaj ili emas rilati — almenaŭ — perletere kun homoj el ĉie el la mondo. Kion povas mi fari por la homaro? Plej baze estas paroli al ili. Se hazarde oni vizitas alian landon, oni eblas koni persone tiujn, al kiuj oni jam skribis delonge, kaj se oni bezonas helpon, oni povas peti ĝin al ili.

Aliflanke, estas esperantistoj kiuj ne havas rimedojn por — aŭ simple ili ne volas — iri eksterlanden, sed kiuj amegas paroli esperante al gentoj el aliaj landoj, kaj tiucele ili ofertas siajn hejmojn por ricevi kaj gastigi geesperantistojn el aliaj nacioj, kun la sola kondiĉo, ke ili devas paroli al ili en Esperanto dum ili loĝas ĉe ilia hejmo. La plejmulto el ili apartenas al monda reto da *gastigantoj* iel speciala, nomita LA PASPORTA SERVO.

Daŭrigota de...

Olga López

Venas el paĝo 11-a

helpis pretigi

puĉon kune kun Generalo Miĥaelo Primo de Ribera. Sed la Generalo estis ankoraŭ malpli manipulebla, kaj la Reĝo vivis kvazaŭ malliberigita ĉe sia palaco. La kialo de la puĉo estis *moraligi Hispanion* kaj gvidi bone la Militon de Afriko. Sed la Generalon mem oni kutime vidis ĉe putinejoj de Madrido, kaj la Milito de

Daŭrigas en paĝo 17-a

Por Hispanio kontraŭ la Reĝo!

Dio

Ĉion, kio mi estas, donis Dio al mi, kaj mi devas danki al Li ĉiun fojon, kiam mi vekigaĉas ĉiumatene. Tial mi kompatas tiujn, kiuj ne kredas pri Li. Ĉi-kuraĝtroan aserton mi aŭdis antaŭ kelkaj semajnoj ĉe fama televida kvazaŭ-debato (*Maŭroj kaj kristanoj*, Tele 5).

Ne tuŝante tion, kio debato devas esti —io kio verŝajne la tipa hispano ignoras—, mi devas klarigi, ke tiuj sensencaj vortoj elvokas profundegan kompaton senmeritan laŭ mi. Kaj mi diras *egan*, ĉar fanatikuloj kutime arogas al si pozicion *altan* de kie li kompatas tiujn, kiuj ne kunsentas iliajn opiniojn. Kaj ne estas alio ol opinio martelumita milfoje ekde kiam ili infanis, farite de profesiaj religiuloj, kion oni diris tiel dogme. Ne nur nepruvitaj, sed nepruvotaj restos por ĉiam ĉiuj tiuj aferoj elvokitaj per tiu mallonga frazo. Ĉar por prui ion, oni devas voli prui, kaj la afero mem devas povi esti pruvebla. Sed tiuj *ajatoj* kiuj kondamnas al infero (aŭ almenaŭ kompatas tiujn, kiuj ne opinias same), ne penas provi sekvi tiujn argumentojn metitajn al ili: ili diras, ke logiko —eĉ inteligento— ne estas tuto, kaj ke ne rajtas fari religion el scienco, ke scienco ankaŭ havas proprajn dogmojn, kaj aldonas serion da stultaĵoj similaj emante nur ĵeti balonojn eksteren por klopodi venki debaton per lacigo de la kontraŭulo, aŭ per tuta kvalifikaĉo, se tiu fiaskas. Ili ne estas inteligentaj debatoj.

Ni ja estas inteligentaj, kaj tion ni pruvos provante rezoni anstataŭ dogmi, konvinki anstataŭ venki, sugesti anstataŭ veneti.

Ni vidu: ĉu iu ajn scias kio aŭ kiu estas Dio? Ĉu iu ajn iam vidis lin? Tiu komerco

ĉe tiom da katedraloj, preĝejoj kaj kapeloj, ĉu estas fundamentita sur faktoj realaj? Ĉu ĉio ne estas ensemblo da *realo virtuala* vendita po prezo de oro?

Ni komencu je la malfino: la *Biblio* mem, sanktega libro por katolikoj kaj protestantoj, ne estas tre serioze konsiderita de la tiel nomitaj *kredantoj*. Dekomence, katolikoj diras, ke oni ne povas preni ĝin laŭvorte, sed oni devas *interpreti la sanktajn tekstojn*, kaj tiun *nobelan sciencan* kiu prizorgas la temon ili nomas *ekzegezo*. Adamo kaj Evo, sekve, ne estis karnaj estaĵoj, sed nur *literaturaj figuroj*. Ĉu ankaŭ estis tia la tria protagonisto en tiu anekdoto, Dio? Ĉar kio ne sencas estas, ke ĉio estas metaforo, *eĉ niaj unuaj gepatroj*, la serpento, la *Tera Paradizo* mem, kaj ke tamen Dio estas reala persono. Estu seriozaj, gesinjoroj!

Ni povus parkuri la tutan Biblion por atingi la konkludon, ke tiu Dio ne nur estas falsa, fuŝa, malbona, militema, rasisma, sed ankaŭ neniam ekzistanta. Kaj ankaŭ, ke ne ekzistis duono da tiuj faktoj kiujn *alegorie* oni rakontas ĉe la Biblio.

Komuna sindefenda argumento de nediskutemulo estas, ke oni respektu la religian sintenon de kredantoj, kiujn niaj vortoj povas ĝeni. Mi tute ne pardonpetas al tiuj, kaj fakte trovas la argumenton trudema: demandu al la murditoj de la *Sankta Inkvizicio* pri tiu respekto, kiun ili ne havis... Kaj tio portas nin al la plej fia argumento buŝa de religiistoj: *oni ne povas juĝi el menso hodiaŭa tion, kion nia praavoj faris en la pasinteco*. Bone, ni ja povas juĝi, ĉar tio estas la ĉefa funkcio de nia cerbo. Ankaŭ, ĉar la mezepoka menso ne diferencas de tiuj de hodiaŭ: la netoleremo, kiun ni trovas eĉ ĉe tiuj KKKuloj estas tiu, kiu mortigis tiom da *sorĉistinojn* mezepoke; konfliktoj

Daŭrigas en paĝo 15

Profine...

Ni Ĥou!

Reage al artikolo de Isabel Acevedo *Ĥo, kia co!* (*KelS 35*), mi cerbumis pri tiu malkresko de uzo de la sono ĥo fare de esperantistoj. Mi opinias, ke ŝi pravas kiam ŝi signalas, ke francoj kaj angloj tute ne konas tiun sonon, kaj hontas, ke tiaj lingvanoj havas tiom da influo en la esperantistaro, kiom sufiĉas por nuligi la sonon ĥon.

Veras, ke la unua vortaro de Zamenhof enhavis malmultajn vortojn kun ĥo, sed ankaŭ estis malmultaj vortoj kun zo (fakte nur unu vorto komencis per tiu-ĉi litero: *zorgi*), sed hodiaŭaj vortaroj enhavas multe da zoajn vortojn, kvankam la ĥoa vortaro malkreskas.

Kion oni povas fari? *Unue*, oni povas fieri pri la ĥo. Se ci ne povas prononci ĝin, favoru cin petante al kompetenta instruisto klarigon pri kiel prononci ĝin (*samtempajn* k kaj h!) *Due*, ĉar ekzistas tiom malmulte da ĥoaj vortoj, ci ne uzu plu tiujn *permesitajn alternativojn* de ĥo en tiuj vortoj, ekzemple *mekaniko* anstataŭ *meĥaniko*, *koruso* anstataŭ *ĥoro*, kaj tiel plu.

Isabel ne tute pravis, kiam ŝi sinonimigis *ĥoleri* kaj *koleri*, estante la unua malsano kaj la dua ĝenesprimo aŭ

animostato. Sed ni povas fari ion pliekiam ni bezonas neologismojn, ni kreu novan ĥoan vorton. Tion mi faris pri la titolo de mia artikolo: *ĥoi* (uzi ĥon senhonte), *ĥoa*, *ĥoe*, *ĥoanto* (tiu estas, mi kaj ĉiuj aliaj personoj kiuj preferas uzi la ĥon), *ĥoonto* (eble ci, leganto), *ĥointo* (tiu, kiu iam senhonte kaj abunde uzis ĥoajn alternativojn, sed ne plu kuraĝas fari tion). Pliĉe ni povas uzu *ĥoito* (ulo al kiu oni parolis uzante la ĥon), *ĥoita*, *ĥoitino*, *ĥoato* (simile), kaj tiel plu. Klarigite estas, ke mi estas *ĥoema* kaj ci, se ci ankoraŭ legas min, *ĥoinda!*

Fine mi diros al *ĥodefendanto*, ke oni povas ankaŭ kontraŭataki: se oni *mekanikigas meĥanikon*, ni *ĥorusigu koruson*, *ĥaruligu karulon*, *ĥuirigu kuiron*, *ĥofinigu kokinon*, ĥaj tiel plu! Sed ni faru tion ĉee, tio estas: forte, elegante, *ĥlare* kaj *ĥuraĝe!*

Subskribas



Venas el paĝo 14

Dio

Rasimiro.

inter araboj kaj izraeloj memorigas nin la *Nokton de Sankta Bartolomeo*, kaj ili ambaŭ sopirigas nin pri la tempoj de *Al-Andalus*, kies tri kulturoj lernis respekti unu al la alia...

Je la komenco de ĉi tiu artikolo ni vidis, kian juĝon ateo meritas de fanatika kredanto. Sed, kian juĝon meritas kredanto —jen fanatika, jen ne fanatika— el konvinkita ateisto? Bone, tiu kiu kredas ke Dio ekzistas, povas kredi ion ajn. Kaj, vere, ne indas debati kun homoj havantaj tian intelektan malriĉecon...



Juan López

Lingve parolante...

Ĉu Varŝavo aŭ Varsovio?

Toponimoj ne estas normigite uzataj de esperantistoj. Mi memoras tiurilate, ke en la Universala Kongreso de Valensjo (1993), ĉe la Ronda Tablo pri *Monato*, ĵurnalisto de tiu magazino demandis al la ĉeestantoj, kion fari: ĉu oni uzu *originalajn* nomojn, ĉu esperantigitajn? La demando ne nur temis pri loknomoj, sed ankaŭ pri tiuj personaj. Zamenhof rekomendis per la regulo 15-a de Esperanto, ke *fremdajn* vortojn oni devas preni el la koncerna lingvo nacia, sed transformante ilin laŭ la reguloj de Esperanto. Li ne diris, ke oni devas *skribi ilin tiel, kiel ili sonas*, sed estante Esperanto lingvo tute fonetika, evidentas, ke oni skribu lokajn kaj personajn nomojn ne ankoraŭ esperantigitajn plej proksime kiel eble al la sono (laŭ reguloj de Esperanto) en la origina koncerna lingvo. Tamen, kelkaj esperantistoj defendas, ke oni skribu iliajn nomojn laŭ *la ortografio de* iliaj gepatraj lingvoj, kaj aldonu interkrampe la *korektan sonon* laŭ la reguloj de Esperanto. Eble ili ne sentas siajn nomojn kiel *fremdaj vortoj*, sed rilate al Esperanto ili ja estas. *Marina*, ekzemple, estas bela virina neesperanta nomo, kiu laŭforme ŝajnas adjektivo. Mi sugestas, ke oni diru *Marino*, anstataŭ. Sed mi komprenas, ke skribante *Marina* kaj agnoskante, ke ĝi estas *fremda* nomo, oni povas uzi ĝin, ĉar *Marina* sonas ekzakte tiel, kiel oni skribas ĝin. Tio estus *malgranda malbono* nediskutinda... Same okazas pri *Irene*,

Fernando, *Edelmira*, *Felipe* kaj multaj aliaj. Alia afero estas *Margaret*, pri kiu mi sugestas skriban formon *Marga-Ret*, aŭ *Margarita*, kvankam oni povas akuzi min pri hispanigo de la nomo...

Sed plej bone estas tute esperantigi ilin *fonetike*, kaj sekve havi tiujn nomojn: *Margarito*, *Eŭsebio*, *Manŭel*, *Eŭfemjo*, *Eŭsebiino*, *Irenino*, *Sebastjano*, kaj tiel plu.

Sed la vera problemo ne estas pri personaj nomoj, ĉar tio gravas al malmultaj, apartaj homoj, kaj la diskuto estas ĉiam je persona nivelo. La vera problemo temas pri nomoj kiujn ni ĉiuj devas uzi: loknomoj. Pri tio amiko observigis min, ke *ĉiu ajn agas laŭ sia kaprica volo*. Mia amiko ekzempligis tiel: la nomon de la ĉefurbo de Pollando poloj skribas *Warszawa*, kio tute ne eblas en Esperanto, ĉar W ne ekzistas, kaj SZ estante du literoj devas esti prononcataj s kaj z aparte, kio okazas en neniu lingvo, inkluzive la pola. Pole oni prononcas ĝin *varŝava*. Kial oni diras *Varsovio* en Esperanto? Mi suspektas, ke el la franca vorto *Varsovie*. La franca estis prestiĝa lingvo dum la XIX-a kaj la plimulto de la XX-a jarcentoj, kaj ĝi trudis sian fonetikismon pri loknomoj al la plimulto de Eŭropo. Sed ne tute. Ĉe hispanoj, ankaŭ oni diras *Londres*, laŭ la franca, sed esperante oni diras *Londono*, laŭ la angla mem. Ĉu la poloj rajtas malpli ol la angloj pri la esperantistigo de sia ĉefurbo?

Oni povas argumenti, ke *Londono* ne enhavas neesperantajn literojn, kaj sekve oni povas fari tion, sed *Warszawa* estas alia problemo. Nu, se oni vere esperantigas la nomo de la ĉefurbo de

Anglio, oni certe devas diri (kaj skribi) ne *Londono*, sed *Landon*. Mi komprenas, ke ekzistas tradicieto en loknomoj kaj eble la malboneto superas la bonon de tiu ŝanĝo, tial mi ne insistas pri *Landon*. Sed pri la pola kazo, mi opinias, ke oni devas nepre diri *Varŝavon* anstataŭ *Varsovion*, honorante la polojn anstataŭ la francojn.

Mi plue proponas, ke oni prononcu ekde nun loknomojn laŭ siaj sonoj en siaj lokaj lingvoj, honore al la naskiĝintoj en la koncernaj lokoj. Tiel, miaj oreloj ne plu zumos kiam mi aŭdos *Murcio*, kio ne estas vera esperantigo, sed esperantis-mo trudita sur la nomon de la urbo kie mi loĝas. Se oni diras *murĉa* en la loka lingvo, oni devas diri (kaj skribi) *Mursjo*, ĉar S estas la plej proksima esperanta sono al la hispana Z, kaj la hispane skribita i en tiu ĉi vorto oni prononcas kiel nian *j* esperantan. Simile, oni trovos pli facile rekoni urbojn kiel *Valensjo*, *Barselono*, *Saragoso*, *Seviĵo* (pli loke sona ol *Seviljo* aŭ *Sevilo*).

Kaj mi proponas aktive. Mi vidas kion oni faras ĉe kongresoj kaj magazinoj esperantaj. Mi opinias, tamen, ke mi devas prononci ĉiam tute esperante, ĉe loknome. Tial, mi ĉiam uzas tiajn esperantigaĵojn. En *Kajeroj el la Sudo* mi jam uzas ne nur en miaj artikoloj, sed ankaŭ en tiuj alies, kiujn mi kompreneble devas provkorekti. Mi esperas, ke tio tute ne ĝenu vin. Eble vi legantoj al kutimiĝos al tiu maniero loknomigi... Se ne, vi uzu la paĝojn de tiu ĉi revuo por enhavi vian malan opinion!

Jesua

Venas el paĝo 13-a



Afriko restis forgescita de li dum pli ol dek monatoj..., ĝis Abd-el-Krim denove atakis. La *Generalisimo* negocis retroiron al kelkaj elektitaj urboj ĉe la marbordo, kaj donis landon kaj monon al la malamikoj por ke ili permesu tion sen ataki. Tio estis la militmaniero de la

generalo kiu faris tiun de la parlamenta registaro pli efika ol ĝi ŝajnis... La Reĝo mem havis tiom malmulte da povo, ke oni nomis lin *Segundo de Ribera* (ĉar *Primo* signifas unua, kaj *Segundo* dua).

En tiu libro oni vidas la respublikismon de Vicente Blasco Ibáñez, sed ankaŭ argumentojn per kiuj li subtenis la opinion, ke la Reĝo devas forlasi la landon. Liaj argumentoj ankoraŭ validas, kvankam en la tria parto, ***Kiel estos la Hispana Respubliko***, oni vidas ankaŭ tre naivaj esperoj, laŭ kio vere okazis kiam tiu respubliko venis. Oni ne povas ne pensi, ke se la Dua Respubliko estus veninta dek jaroj pli frue, kiam ankoraŭ estis libereco en Hispanio (sub parlamentara monarĥio), ne estus okazinta milito kvin jarojn poste. Aŭtoritatismo radikaligas popolon. Nun ni ĝuas parolamentan, kvazaŭ demokratan, monarĥion; kvankam post la 23-a de februaro de 1981 neniu plu parolas pri la respubliko estonta de Hispanio. Eble mi abundos pri la du faktoj alian escon... Dume, mi ege rekomendas al vi la legadon de la trilogia eseo de S-ro Vicente Blasco Ibáñez.

Olga López.

Eseo monatotria

Enkonduko.- La trafiko kaj konsumo de drogoj (tiuj toksaj), kaj la dependoj psikaj kaj fizikaj kaŭzitaj de sia uzado, estigas ĉiutage kaj tutmonde egajn problemojn sanajn, politikajn, kaj socimarĝenajn; antaŭ kiuj ĉiaj subpremaj iniciatoj estas konsistigintaj la plej kutimajn kaj eĉ obsedajn, reagojn flanke de preskaŭ ĉiuj estraroj el la mondo. Tial oni eniris en sinnutran pligravigantan haoson, kies sola elirejo ŝajne estas pliintensigo de la polica subpremo, kiu, siavice, kondukas al pligrandigo de la haoso. Ĉiam kaj ĉie el la mondo estas ekzistintaj drogoj kies uzo estis socie agnoskata kiel normala kaj, iufoje, religicela. La vigliganta internacia problemaro estigita de la nakotiktrafiko estas historie ĵusa. La kaprica prohibicio de kelkaj drogoj estas politiko kiu serioze endanĝerigas la popolan sanon, la juran civitanan sekurecon, la rajto je intimeo, kaj la liberecon je kredoj. La prohibicioj kiujn oni suferas nuntempe estas historia eksperimento, altrudita de Usono al la cetera mondo ekde malfrue en la 2-a kvarono de la 20-a jarcento. La frankisma estraro de Hispanio ne partoprenis tiun usonan krucamiliteskan kampanjon ĝis la jaro 1966-a, kiam ĝi subskribis la traktaton de la Ĝeneva Ununura Konvencio de 1961-a, kaj la leĝigo de tiu traktato ne okazis ĝis 1971-a. Dum en la ceteraj eŭropaj landoj kaj en Usono, kun pli longaj prohibiciaj spertoj, la narkotikoj jam estis ŝlosilproblemo, en Hispanio tiu ĉi konflikto ne aperis ĝis kiam la polico kaj la juĝa sistemo komencis enkarcerigi homojn obece al la nova subprema leĝaro. Dum en Hispanio, ĝis la sesdekaj jaroj, la anfetaminoj estis libere disvendebaj, kaj tio ne kaŭzis ian ajn socian konflikton, en Usono kaj Britio la kokainemuloj jam konsistigis *socian plagon*.



Toksaj drogoj — Proponoj kontraŭprohibiciismaj.

En la tiam Hispanio, tamen, ne ekzistis eĉ unu heroinemulo kaj estis eta nombro de mezklasuloj kaj altklasuloj mezjaraĝaj (t.e.: armeanoj, kuracistoj, ktp) en plenaj profesiadoj, kiuj ricevas siajn dozojn da laŭleĝaj opiidaĵoj; ĝis kiam la ekstera usona politiko trudis leĝojn, kiuj post malpli ol 10 jaroj estis devenigintaj problemojn kiuj jam ŝajnas *deĉiamaj*. Jen kelkaj el la postsekvoj de tiu ĉi milito kontraŭ la drogetrafiko:

- 1e.- Disvastiĝado de droga kaŝmarketo kiu komercas pri ĉiam pli gravaj volumoj, kaj kiu endanĝerigas la fundamentojn mem de la rajtorispektaj ŝtatoj.
- 2e.- Pro la longdaŭra manko de ekonomiaj bonaŝancoj, en multaj malfavoritaj regionoj oni amase elektas eniri la kaŝekonomion, malgraŭ ĉiuj ĝiaj postsekvoj de perforto kaj deliktoj.
- 3e.- La plisaturiĝo estigita de la prohibicio stagnigas la juĝajn sistemojn, kaj tio nesufiĉigas la dezirojn respekti la principojn de jura sekureco, senkulpeca antaŭsupozo, kaj intimecraĵo.
- 4e.- La ofta aplikado de superproportciaj punoj al la pridrograj deliktuloj amasigas ege la loĝantaron de la prizonoj, kaj tiel la senliberulejoj, krom perdi sian malmultan sencon je sociaj redukiloj, alportas malbonigojn al la vivkondiĉoj de siaj loĝantoj.
- 5e.- La kaŝmarketo de kontraŭleĝaj drogoj devenigas altajn prezojn, kiuj, siavice, estas fortaj kuraĝigiloj por sia ekzisto mem.
- 6e.- Ofte la trafikistoj, pro sia avareco, falas la drogojn serĉante pliajn profitojn, kaj rezulte de tio aperas veneniĝoj, kaj eĉ mortoj de konsumantoj. Aldone tion, sed samkiale, de tempo al tempo la

trafikistoj kobajumas siajn klientojn; kun ties ignoro; por enkonduki en la kaŝmarketon novajn sintezajn drogojn.

7e.- La plurfoja kontraŭhigiena uzado de injektiloj flanke de kelkaj drogemujoj estigas multnombrajn kontaĝojn de B-hepatito kaj AIS-o (mallongigo de Akirita Imundeficita Simptomaro).

8e.- La satanumo de la konsumo de kelkaj toksodrogoj malhelpas la kunekzistadon kun moroj kaj substancoj de jarmiloj uzataj. Nur la edukado pri toleremo povas kunekzistigi nin senkonflikte kun la drogoj.

Resume, la problemaron de la marĝenitaj partoj de la socio; tiuj kie la deliktoj kaj la drogoj transformiĝas en kutimajn esprimojn je senesperigo; oni ne sukcesos solvi per subpremado, sed pere de justaj redisdonaj politikoj, krom per kreado de riĉeco. La kontraŭleĝaj drogoj devas ĉesi esti uzataj kvazaŭ kulpopaga kaprido de maljusta socia sistemo, kiu permesas ĝin unuigi, sen ia ajn transformata kompromito, al diversaj grupoj sociaj, sen nuancoj, je la manieroj faŝisma aŭ rasisma. Tiel la drogoj estiĝas argumento de familiaj kaj laboraj konfliktoj senplende al la ekzistanta realo: *la drogo kulpas!*

Diversaj reagoj kontraŭ-prohibiciismaj en la historio.-

La 30-an de aŭgusto de 1922, la revoluciulo Enrico (enriko) Malatesta aperigis en la anarĥiisman ĵurnalon *Umanita Nova* lia jenan artikolon sub la titolo *Kokaino*:

En Francio ekzistas tre striktaj leĝoj kontraŭ tiuj kiuj uzas kokainon, kaj, kiel kutime okazas, la plago etendiĝas kaj pliintensiĝas spite al la leĝoj, kaj, eble, danke al la leĝoj. Same okazas en la cetera

Eŭropo kaj en Usono.

D-ro Courtois (pr. kurti'a'), de la Medicina Akademio de Francio, kiu jam la pasintan jaron lanĉis alarmokrion kontraŭ la danĝero de la kokaino, konstatinte la malsukceson de la punleĝaro, petas..., novajn kaj pli striktajn leĝojn. Jen la malnova eraro de la leĝofaristoj; kvankam la spertoj estas ĉiam, senvarie, pruvintaj, ke neniam la leĝo; ne gravas kiom barbara ĝi estas; taŭgis por forigi malvirton, aŭ malkuraĝigi la delikton. Ju pli severaj estas la punoj trudotaj al la konsumantoj kaj trafikistoj de kokaino, des pli alloga fariĝos por la konsumantoj tiu ĉi frukto malpermesita, kaj en la spekulaciistoj, la profitavideco, ku jam estas ege granda, kreskos eĉ pli pro la kresko de la leĝaj punoj. Estas vane fidi je la punleĝoj. Ni proponas alian solvon. ONi deklaraciuj libera la komercon de kokaino kaj vendigu ĝin po sia akirkosta prezo aŭ, eĉ po malplia kosto ĉe la ekspedejoj (aŭ monopolvendejoj). Farinte propagandegon al la gento rilate la malutilojn de la kokaino, kiujn ili povos libere aĉeti kaj konsumi; neniu farus kontraŭ-propagandon ĉar neniu povus profiti je la malutiloj al la kokainemuloj. Certe, tiel ne malaperus tute la malutilan konsumadon de la kokaino, se plu ekzistus la sociaj kaŭzoj kiuj impulsas la malfeliĉulojn uzi la stuporigilojn. Sed malgraŭ ĉio, la problemaro malpliakraĝus, ĉar neniu povus gajni profitojn pri la drogvendoj, kaj tial neniu povus spekulacii pri la aresto de la spekulaciistoj. Pro ĉio dirita, nia propono ne estos prikonsiderata, aŭ oni ĝin pritaksos kiel ĥimeran kaj frenezan. Tamen, la inteli-gentuloj kaj neprofitantuloj eble diros, ke antaŭ la pruvita senpoveco de la punleĝoj, eble estos bone, almenaŭ kiel eksperimento, provi la metodon anarĥiisman.

Poste alvenis multaj jaroj de



krucmiliteskaj, prohibiciismaj politikoj internacie. Esence, la prohibiciismo plu regas senŝanĝe la mondan politikon, malgraŭ siaj malsukcesoj. De ne multaj jaroj komencis fortiĝi la opinifluo kontraŭa al la prohibicioj pri la toksaj drogoj. La usona nobelpremiito pri ekonomio Milton Friedman (pr. fridman) dum intervjuo por la germana magazino *Der Spiegel* (pr. spijgel, ĝi signifas *spiegulo*) asertis, ke ĉiuj klopodoj solvi la problemojn de la narkotikoj punleĝe, aŭ per la agado de la polico, estas kondamnitaj je la malsukceso, ĉar la interveno de la ŝtatoj en la drogmarketo aperigas altegajn prezojn por tiaj substancoj, kiuj siavice kuraĝigas la aktivadon de la krimasocioj, kaj ke li estas favora al la abolicio de la prohibicioj kaj pritrakti la stuporigilojn malpermesitajn same kiel la alkoholaĵojn aŭ la tabakon. Li aldonis al tio, ke en la milito kontraŭ la narkotikoj, la persekutatoj kaj siaj persekutistoj kunhavas la intereson apogi la malpermeson, ĉar tiu ĉi garantias bonajn prezojn al la trafikistoj, kaj samtempe kreskantajn salajrojn, grandan prestiĝon, kaj fulmorapidajn karierojn al la ŝtatlaboristoj respondecaj pri la persekutado. Estas ĉiufoje pli malfacile por la *generaloj de la milito kontraŭ la drogoj* alporti moralajn argumentojn defende al sia politiko. Kun kreskanta ofteco oni alvokas ilin por raporti pri siaj atingoj kaj strategio. La Svisa Federacia Estraro ekpraktikis eksperimente, antaŭ nelonge, la laŭleĝan disdonadon de heroino por mildigi la personajn kaj sociajn katastrofojn okazigitajn dela kontraŭleĝaj trafiko kaj konsumo. Estante prezidanto de la Justica Plejsupera Kortumo de Bolivio S-ro Edgar Oblitas, li asertis la jenon: *La toksodroga trafiko estas sub la kontrolo de internaciaj krimasocioj kies ekonomiaj potencoj estas tiom grandaj, ke foje ĝi superas tiun de la estraroj de la drogoproduktaj landoj (kiel Bolivio). Ni devas esplori; prikonsiderante la opinifluojn aperintajn, ĉu en la drogoproduktaj, ĉu en la*

drogokonsumaj landoj; la konvenecon de iom-post-ioma legalizo de kelkaj psikaktivaj drogoj. Se legalizo de la drogoj povus kalkuli kun la necesa socia subteno, tiam oni devus serioze pensi pri ties reguligo kaj pri la leĝaro necesa por la protektado de la plej malfortaj uloj. Malgraŭ la subteno de iuj elstaruloj el Eŭropo kaj Latinameriko, la debato pri la legalizo de la toksodrogoj ankoraŭ estas marĝena temo de la kunvenoj aranĝataj por la lukto kontraŭ la trafiko.

Kelkaj eŭropaj urboj estas rubrikintaj la tiel nomitan *Rezolucion de Frankfurto* de 1990, kun la espero kapti la atenton de la naciaj estraroj pri la sendefendeco kiun suferas en siaj urboj la sano kaj la publika ordo, kaj kiu devenas, ne de la narkotikoj, sed de ties kontraŭleĝeco. La reprezentantoj de tiuj urboj petis la Eŭropan Komunumon modifi la nunan politikon pri narkotikoj, per dono de ĉefroleco al la strategio sanfaka celonta la malgrandigon dela malutiloj kaj la socian antaŭeviton, kaj ne la devigan abstinadon.

En 1992 komisiono esplora de la Eŭropa Parlamento prezentis raporton al la deputitoj kies resumitajn konkludojn mi citos sekve:

La Komisiono havas profundan konvinkon pri la fakto ke krom la fenomenon de la trafiko de stuporigiloj, estas necese esplori la postsekvojn de la lukto kontraŭ la drogo, kaj, ĉefe, la konsekvencojn de tiu lukto por la demokratio, la sekureco kaj la libereco de la civitanoj. La konsumo kaj trouzo de drogoj devas esti konsiderataj, ĉefe, kiel problemoj sana kaj flega, kaj ne subpreminda aŭ juĝinda. La posedo de stuporigiloj po malgrandaj kvantoj, por persona konsumo, ne devas esti konsiderata kiel punenda delikto. La leĝo pri stuporigiloj devas krei distancon inter la konsumanto kaj la krimomondo, kaj eviti la transformigon de la toksemulo en deliktulon, malhelpante tiel ian ajn eblecon reenmetiĝi en la socion.

La flegado al la toksemuloj ne devas esti malhelkpa de la punleĝoj.

La lukto kontraŭ la toksomanioj nur pere de la punleĝoj kiuj raportas la abstindevon, aŭ pere de la publika helpo por abstini je stuporigiloj, estas malsukcesinta. En tiu kunteksto la ŝtato-membroj devas garantii kuracadon kaj injektilojn senpagajn, same kiel la provizon de kuraciloj (ekzemple, metadono) flanke de klinikoj rajtigataj.

La maniero kiel oni alfrontas la problemaron de la drogoj en la Eŭropa Komunumo estas preskaŭ malefika. Ĉiujare kreskas la nombro de la konsumantoj, la mortoj kaŭzitaĵoj de la drogoj multobliĝas, aperas novaj tipoj de stuporigiloj pli potencaj kaj malutilaj kaj la produktado pliigita. La konverto de kapitaloj kontraŭleĝe akiritaj per la trafiko, en investojn laŭleĝajn ne estas sukcese kontrolataj malgraŭ ĉiuj penoj faritaj.

La lukto kontraŭ la stuporigiloj nek devas koncentriĝi je la konsumantoj, nek je la bazo de la ĥierarkio de la trafikistoj, sed je la trafikisto internacie organizita, kaj je la trafikistoj altrangaj. Estas necese alproprigi sintenon pragmatisman, celantan la malgrandigon de la malutiloj rilataj al la konsumo kaj al la trouzo de la drogoj, helpante flege kaj socie al la toksemuloj; tia sinteno devas celi la aranĝon kaj garantion de disponebleco de nefalsitaj stuporigiloj, po siaj ĝustaj dozoj, cele al la malplinombrigo de la mortoj kaj aliaj sanproblemoj ligitaj al la drogoj (ekzemple: kontraŭoj de la AIS-viruso), kaj ankaŭ por malpliigi la nombron de instigitaj krimoj.

Ĉar la trafikistoj nepre bezonas enkonduki en la laŭleĝan ekonomion la grandegajn


profitojn akiritajn danke al la kontraŭleĝeco de la drogkomerco, oni esploru, preter la necesa kontrolo de la rondoj ekonomia kaj financa, la rimedojn por eviti la amasiĝon de la menciitaj profitoj, pere de komerca reguligo pri la substancoj nuntempe malpermesitaj.

En la ĉijara aprilo la Prezidanto de la Respubliko de Portugalio, Jorge Sampaio, kaj la Prezidanto de la Portugala Asembleo, Antonio Almeida (pr. almeĵda) Santos proponis antaŭ la parlamento de sia lando la starigon de kontraŭtrafika ŝtato. Almeida Santos defendis la akiron de stuporigiloj, flanke de la ŝtato, pro ĝia posta disdonado, sen falsaj, al la posedantoj de dokumento kiu atestas, ke ili estas toksemuloj, kaj kun kuracila certigilo pri la drogo de kiu ili dependas, kaj de la minimuma kvanto kiun ili bezonas. Ĉimaniere li estis en konvinko pri la sukceso malaperigi la trafikiston

ĉiopovan, pro la konkurenco komerca de tia ĉi ŝtato. Almeida Santos montris sian malkonfidon pri la subpremaj rimedoj, pritaksinte la kreskantajn povon kaj sofismokapablon de la organizaĵoj narkotiktrafikaj. Li proponis, ke oni akceptu definitive, ke toksemuloj ne estas krimuloj, sed malsanuloj kies kuracojn devas pagi kaj gvidi la respondecoj de la ŝtato, pere de la kontrolo kaj distribuo de la stuporigiloj, konvene dozumitaj.

Aparte, Sampaio agnoskis ke jam estas la momento imiti la ekzemplon senpunigan de aliaj landoj kiel Nederlando, sen ekskludi la antaŭevitajn iniciatojn.

Por konkludi mi mencias la droglegalizan proponon faritan en Sevilo, en februaro de 1991, de la tiel nomita Explora Grupo pri Krimea Politiko, kiun konsistigis cento da profesiuloj el la juĝistaro krom universitataj fakuloj. Mi ne komentos ĝin por ne tro longigi tiun ĉi artikolon, sed eble ĝi taŭgos kiel bazo por estonta legalizo de la drogoj en Hispanio.



Konkretaj, necesaj kaj faktablej projektoj por Hispanio.— Unue, oni devas denunci la Ununuran Konvencion pri Stuporigiloj de 1951, la Interkonsenton pri Psikaktivaj Substancoj de 1971, kaj la Konvencion de la Unuiĝintaj Nacioj kontraŭ la Eksterleĝa Trafiko de Stuporigiloj kaj Psikaktivaj Substancoj de 1968.

Due, oni devas strebi al egaligo kaj normaligo de la leĝaroj de Hispanio kaj la ceteraj ŝtatoj de Eŭropo, rilate la drogmarketojn, serioze konsiderinte la rekomendojn faritajn de komisiono de la Eŭropa Parlamento pri la temo. Tiel oni reguligu la drogojn toksajn simile al la alkoholaĵoj kaj la tabako, aŭ kiel kuracilojn (depende de sia uzo flanke de la plenkreskuloj).

Trie, oni helpu la ŝtatojn drogproduktistajn evolui ekonomie kaj socie.

Kvare, oni ŝajnas akcepteble, rilate la polican agadon, subpremi provizore la altrangan narkotiktrafikon pere de plirapidigo de juĝaj procezoj, kaj starigante kontrolojn priimpostajn, financajn, kaj doganajn.

Krome, oni devas limigi la punojn en Hispanio, rilate ĉitemon, al tiu kontraŭ la falsoj kaj fraŭdoj, la provizo al ceteruloj sen ties konsento, kaj la distribuo al neplenaĝuloj aŭ al mensaj handikapuloj.

Kvine, oni devas enkadrigi la portoksemulajn helpsistemojn en la publikan sansistemon kiel alian simplan fakon, ne kreante paralelajn sistemojn.

Sese, oni kuraĝigu la reenkondukojn de la toksemuloj en la socion pere de la informado kaj klerigado al la socio mem, kaj al la trafitoj de la problemo. La his-

pana estraro devas klopodi la unuigon de la leĝaroj de ĉiuj landoj de la Eŭropa Unuiĝo rilate la privatajn kuracadejojn. Ĝi ankaŭ devas klopodi modifojn deliktaj ke iuj toksemuloj estos senigataj de siaj liberoj, ili plenumus siajn kondamnojn ĉe centroj adekvataj por sia socia reenpartigo.

Sepe, oni devas elabori melsaman kulturan politikon, celante kuraĝigi la solidarecon, la toleremon, la kamaradismon, la socian partoprenon kaj la defendon de la liberoj. Por tia politiko estos fundamente uzi lerte kaj saĝe la amaskomunikilojn. Por helpi la toksemulojn, dum la menciitaj legalizaj proponoj ankoraŭ ne estas realoj, mi opinias konvena la disdonon de toksodrogoj, sub medicinista kontrolo, al siaj kutimaj konsumantoj. Sed la apogo al la drogemuloj kaj la deziro pri racia uzo de tiaj substancoj, ne efektiviĝos sen sufiĉa socia partopreno. Tiucele oni plifortigu la organizaĵojn neestrarajn, la asociajn voluntularojn, ktp. Aldone tion ĉi, estos necese investi je la farmacia klerigado de la popolo por superi la nunan situacion plena de antaŭjuĝoj ĝeneraligitaj kaj ignoreco.

José Pina Tuells.

verbon en Esperanto, simple metante rektan objekton ricevantan la agon.

Bedaŭrinde estas multe da seriozaj gesinjoroj kiuj naskas dikajn librojn gramtikigante kion jam estis klara, simpla kaj logika. Mi proponas reiri al la origino de Esperanto, kaj se ne bruligi, ignori tiujn *bibliojn gramatikajn* de Esperanto, veraj ekzemploj pri kion ne fari. Eĉ la faman verkon *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto*, de Waringhien kaj Kalocsay oni devas rigardi kiel nur propono, ne aŭtoritato. Malbonas la aferon tiuj, kiuj ne pensas, sed sakrigas la verkojn de elstaraj esperantistoj.

Mi lacas..., aŭ laciĝas..., aŭ laciĝas?

Konversaciis mi antaŭ kelkaj semajnoj pri *laco pro varmo*. Mi diris, ke *mi lacas pro varmo*, kaj —kiel kutime inter esperantistoj— venis la tuja korekto: *ne lacas, vi laciĝas*. Li aldonis, ke *statverboj ne povas esti reflektivaj*. Mi demandis al li pri listo de tiuj misteraj *statverboj*, kaj li diris, ke oni serĉu ĝin ĉe gramatikisto. Kaj mi tiam ekpensis, ke Esperanto estas ma-gia simpla lingvo elpensita de genie simpla homo, sed be-daŭrinde postuloj malsimpligis ĝin per stultaj reguloj elinte siajn senlogikajn patrlingvojn. *Doni* estas transitiva verbo **en la hispana** kaj aliaj lingvoj. Sed rigardante nur ene de Esperanto, mi povas diri *mi donas*. Mi estas donanto *ĉar mi donas*. Kion donas mi? Nenion. Aŭ ne gravas tio, kion mi donas: kio gravas estas, ke mi donas. Tiukaze *doni* estas netransitiva. Aliflanke, *mi promenas la straton* signifas, ke *promenas* estas transitiva verbo, ĉar la agon promeni ricevas la straton, senrigardante de tio, kion la frazo signifas en la hispana, la ĉina aŭ la hungara aŭ ktpa ajn.

Tio okazas, ĉar Esperanto estas la plej fleksebla lingvo el la mondo. Oni ja povas transitivigi iun ajn

Okaze de la 56-a Hispana Esperanto-Kongreso
(Valencio, de la 8-a ĝis la 13-a de Julio 1997)

Impresoj de kongresano

La mateno de la 9-a de julio vekigis neordinare friska en Valencio. Kongresano, post alveturo tut-nokta kaj maldorma, lantpaŝe migras tra la malplenaj urbo-stratoj ale al la kongresejo: la Fakultato pri Filologio de la Valenciana Universitato. Post duon-hora promenado li ekvidas sur fasado grand-dimensian, iom kiĉan slogan-tukon kun verda stelo: jen mi trafis, li pensas, kaj ĝojo tuj plagas lian koron rimarkante amason da junaj homoj kunpuŝiĝi antaŭ la kongreseja pordo: ankoraŭ ne estas la oka horo kaj jam abunde pululas la kongresanoj... kaj tiel junaj!, diras por si la ĵus alveninta, ver-ŝajne nia *sekto* ne plu malviglas..., hej homoj..!

Subite pedelo apertas la pordon kaj jen la lavango, en la daŭro de ekfulmo, disvanuas tra la koridoroj de la fakultato... lavango da hastemaj studentoj, kun nervoj muelitaj kaj okulaj blu-ringoj pro vigilo, kiuj kuras por bona sid-loko en la ekzamenejo; eble por multaj ĝi temas pri la lasta ekzameno de la lerno-jaro, antaŭ la sopirataj somerferioj...

Sukceson, kamaradoj!, bon-deziras la kongresano, kaj, elrevita, li sidiĝas orfe sola sur perono ĝis la naŭa kaj duono, kiam la kongresa akceptejo malfermiĝos.

Kvankam la man-programo de la kongresano anoncis ke du internaciaj aranĝoj simultanaj al la HEF-kongreso, li apenaŭ spuris pri ili. Rusoj, poloj kaj rumanoj — artistoj el ses trupoj — ja parto-prenis kaj kontribuis al la programo per siaj folkloraj prezentadoj, sed nur malmultaj el ili estis esperantistoj. Krome preskaŭ ĉiuj programeroj disvolviĝis en la kadro de la Hispana Esperanto-Kongreso, kaj ne de la

aliaj du fantomaj aranĝoj.

La kongresano ege aprecis la modelan Esperanton de Gian Carlo Fighiera kaj ties oratoran talenton, kvankam la temon de lia parolado li forgesis, eble ĉar ĝi ne estis tre interesa. Ankaŭ aliaj prelegantoj plaĉis al li, ekzemple la andaluzo Miguel Fernández, kiu deklamis —kor-preme kiel ĉiam— pri la vivo kaj verkoj de Federico García Lorca. Se eble, iom ĉagrenis la kongresanon la fakto ke nur man-pleno da esperantistoj ĉeestis ĉi ĝuindan prelegon, dum la sama aŭditorio gastiginta la poezian vejnon de la du granadanoj pleniĝis ĝis elverŝiĝo okaze de ia orel-agaca prezentado far hene misagordita koruso.

Aliflanke tre kortuŝis la ĉeestantojn la sentema omaĝo-kunveno al du forpasintoj: la redaktoro de *Heroldo* Ada Fighiera-Sikorska kaj la madrida esperantisto Juan Carlos Ruiz.

Sed certe la plej interesaj programeroj kondensiĝis al la sabata post-tagmezo. Post gustumado de giganta paeljo en la vilaĝo Cheste, venis la vico al *ajnista* prelego de Fernando de Diego, kiu mem ne povis veturi al Valencio sed konfidis la voĉ-legon de sia teksto al M. Fernández. Poste sekvis premiera prezento de du verkoj: la novelaro *Ekstretoj*, lasta elkovaĵo de la opo *Ibere Libere* (J. Camacho, Liven Dek, M. Fernández kaj G. Neves), kaj la nefacile klasifebla *Karnavale*, de la kataluna bardo Abel Montagut.

La kongresano partoprenis ankaŭ la fakan kunsidon de HALE (Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj) kaj li ĝoje konstatis ke ĉi asocio iom post iom eliras sian krizon kaj plu iras antaŭen, precipe danke al la egaĝiĝo de juna kaj entuziasma teamo. Li sincere esperas ke HALE forskuos de si la

jugon de oldaj inercioj kaj antaŭjuĝoj, forlasante definitive sian rancan kruc-militon kontraŭ naciismo. Li opinias ke la komuna malamikoj situas tute alie.

Kvankam la kongresano ne povis mem ĉeesti, du programeroj altiris sukcese la atenton de la publiko: debato pri «La lingvoj de Hispanio» [tiel!] sub la gvido de Antonio Alonso, kaj la prezento de la HEF-paĝo en Internet, far Marcos Cruz.

Pluraj anekdotoj tamen malĝojigis la kongresanon. Li vidis malriĉajn eksterlandanojn farĉi al si la stomakojn per la maten-manĝo ĉar ilia aligkotozito verŝajne ne rajtigis ilin al tagmanĝo en la hotelo, kune kun la aliaj esperantistoj. Li sentis fremdan honton ankaŭ vidante kiel responsuloj de la manĝejo sin dediĉas al la ĉaso de orient-eŭropanoj kiuj pelataj de malsato falsas manĝ-kuponojn.

Entute ĉi HEF-kongreso ŝajnis iom mucida

al la kongresano. Se escepti la perlojn pri kiuj li supre raportis, la ĝeneralan etoson li trovis dekadenca, morna kaj kaduk-spirita: forme kaj enhance. Laŭ li, trivialo, malseriozo kaj suprajeco regis, kiuj ecoj estis volvitaj per



sekteca liturgio. Estas tamen duon-mave, li rikanas, ke novaj gejunuloj maltrafis ĉi kongreson: li imagas sin en la haŭto de dekok-jara komencanto, kiu konatiĝas kun Esperanto en tia ĵurasa parko, kaj pro hororo liaj viloj tuj hirtiĝas kiel najloj.

Tamen li ne ŝiras al si la vestojn pro senespero tial, ĉar li ne estas nov-bakita esperantisto. Li ja ne esperis alion el ĉi relative amasa kongreso; do oni ne povas diri ke liaj atendoj vidiĝis trompitaj. Cetere oni konvinke argumentis al li ke *tia* estas Esperantio — aŭ almenaŭ ties grava parto —, ĉu li ŝatas aŭ ĉu ne. Kaj la kongresano bone scias ke ankaŭ li apartenas al tia komunumo,

ĉar li estas esperantisto — eĉ se foje li ne trovas multajn samideanojn en tiu koterio.

* * *

La kongresano reveturas al sia urbo. Sun-strioj tag-mezaĵ tranĉas la glacon de la buso malhelpante al li plulegon. Li flank-lasas la ĵus aĉetitan libron. Prefere tiel, li pensas, fakte ĉi lasta novelo iomete ĉagrenis lin. Li surmetas la aŭdilojn de sia portebla ŭalkmano kaj diskas ientien serĉante radio-elsendon seninterferan. Fine li trovas, sed ne ŝatas kion li aŭdas. Elŝaltas li ĝin. La buso preskaŭ malplenas, la kongresano etendas la krurojn sur la apuda sid-loko kaj enmemiĝas.

Li bedaŭris la nevidon en Valencio de multaj geamikoj, ĉefe katalunaj el la Princ-lando, kvankam li scias pri iliaj motivoj. Tamen li kovas la esperon ke nova periodo malfermiĝos kaj ĉesos la bojkotado kontraŭ la iniciato de eŭskaj kaj katalunaj esperantistoj: kaj sur la paĝoj de *Boletín*, kaj per fakta neparto-preno en la alies aranĝoj.

Kiel ajn la kongresano havis la okazon renkontiĝi en Valencio ankaŭ kun interesaj homoj. Ekzemple li konatiĝis kun simpatia ulinparo kiu helpis lin forskui de si la tedon. Ali-flanke li delonge aŭdis klaĉojn kaj legendojn pri pluraj esperantistoj, kiujn li ankoraŭ ne konis persone, kaj ĉi okazo utilis al li por plene dementi tiajn onidirojn.

Sed ankaŭ mirindaĵoj vidiĝas inter esperantistoj, konsolas sin la vojaĝanto. Propraokule li vidis ruĝulon kaj dekstrulon en brakumo, aŭ ĝisostan hispanon promeni braken-brake kun radikala naciisto, ambaŭ gaje babilantaj pri komune amata ĉevaleta. Kaj li inklinas kredi eĉ ke toleremo funkcias.

Tamen la kongresanon perturbas iom amara sento, tial ke aĉa faro — kvazaŭ klingo-klingo mort-anonca — metis diskordon en belan post-tagmezon. Jen subite la vojaĝanto kredas sin naiva, kaj li tuj reagordas sin... La buso baldaŭ atingos la urbon... dura labor-tago min atendas morgaŭ, li pensas.



Akto de la HALEa kunveno dum la Kongreso Eŭropa 1997.

Okazis la kunveno la 10-an de julio de 1997 en la Salono *Ada Fighiera* de la Fakultato pri Ekonomio, strato Vicente Blasco Ibáñez, je la 4-a horo. Oficis kiel sekretario kunvena la redaktoro de *Kajeroj el la Sudo* pro neĉeesto de la ofica sekretario.

Akordoj:

1. La akto de la antaŭa asembleo estis aprobata pro unanimeco.
- 2 La kamarado kasisto, José María Bernabéu Franco, prezentis la kontestaton de niaj financoj: resume, ni havas 90 000 pesetojn. Li ankaŭ informis, ke li ne havas nombrojn pri la libroservo. Oni decidis peti al kamarado Nikolao Šil Karbaĝo, ke li sendu bilancon. Ankaŭ oni rekomendis, ke ni legu kaj disvastigu la *Laboristajn Kronikoj*-n kaj aliajn verkojn.
3. Nia ĉefa celo estas disvastigi Esperanton en la laboristaj medioj. Du samideanoj starigis kursojn, sed ili fiaskis ambaŭkaze. Junuloj ne venas pro manko da tempo. La prezidanto diris, ke li insistos.
- 4 *Kajeroj el la Sudo*: oni sendu la magazinon nur al la abonantoj de nia kotizo. Oni povas pagi per bileto en koverto. Ankaŭ, ne pagantoj povas ricevi la magazinon, sed ili almenaŭ devas agnoski, ke ili ricevis ĝin. Ni akordis ankaŭ sendi la revuon al elstaraj samideanoj.
5. *Kotizo*: 1000 ptj. por anoj de HALE. 1200 por tiuj kiuj ne volas esti anoj de nia asocio, sed ili volas aboni kaj legi la revuon. Ni balotis pri tio, estante la rezulto: 6 por dupreza kotizo, 2 por unupreza kotizo.
- 6 *Rilato kun SAT*: ne ekzistas. Por kiu afero oni devas proponi agadon kun SAT? Ĉu iuj el vi deziras ŝanĝi la preskaŭ

neekzistantajn rilatojn kun la aliaj leaĵoj kaj SAT?

Proponas Marco Botella, ke kion oni sugestas pri agado rilate al leaĵoj kaj SAT oni pritraktu kaj balotu, sed oni anoncu sufiĉe antaŭe. Li krome proponas, ke oni elektu kapablan personon por redakti *Sennaciulon*, aparte de ofica laboro en Centra Oficejo, ĉar la nivelo de tiu revuo malaltiĝas ĉiutage. Ni balotis tiel: 5 por kaj 3 ne balotis.

7 *Havaĵoj*: ili restas same ol antaŭe.

8 Ĉu oni devas anstataŭigi nian Prezidanton? Proponu sin, kiu volu. Tamen, neniu proponis sin, kaj la Prezidanto restas la sama.

9 Pri la *Proponoj de la Sekretario* ĉe la lasta numero de *KelS*, ni decidis:

1 Tial ke ĉiu ano de HALE ankaŭ apartenas al HEF, kaj ke ni devas profiti ĉiun esperantan renkontiĝon, la propono ne eblas. Baloto: por 0, kontraŭ 5, ne balotis: 2.

Pri la aliaj du punktoj, oni diris, ke ne endas, sed indas ŝanĝi la pensmanieron, sed la afero demandita estas nedifina. En niaj kunvenoj oni devas veni kaj pridiskuti siajn proprajn proponojn.

10 En *petoj, demandoj kaj proponoj*, nur la kunvena sekretario sugestis, ke pro la laceco de ni ĉiuj, ni devas havi bieron pagante HALE, sed la propono oni malestimis, kaj sekve la proponinto manifestis, ke li ne venos denove.

Fermis la akton la Prezidanto je la sesa horo.



Rakonto Tanaŭsuo

Iam, antaŭ jarmilduono, en eta insulo apud Afriko kies rondon oni povas transiri piede en du-tri tagoj, troviĝis princino kiun du princoj volis edziniĝi. *Mi donos mian koron al vi*, diris Tanaŭsuo. *Mi donos mian vivon por vi*, diris Majantigo.

Surprizas nin, ke tiutempaj knabinoj —eĉ se princinoj, aŭ eĉ princinoj— povis elekti, kaj la patro ne direndis ion ajn. Sed alian kulturon havis la benaoaranoj, hontinde perditan. Finfine ŝi elektis: ŝi edzigos Majantigon, la reĝo de la orienta parto de la insulo. Tanaŭsuo, reĝo de la meza parto, subigis sian kapon, kaj ĉar li ja amis la ĉarmulinon, li agnoskis ŝian elekton malgaje, sed amike.

Sed la paro ne multe amindumis kaj feliĉe vivis. Post kelkaj monatoj strangaj ŝipoj venis, kiuj portis strangajn homojn vestitajn per fero. Ankaŭ ili portis kvarkrurajn bestojn grandajn, sur kies dorso ili sidis kaj la tuto trairis la insulon pli rapide ol iam vidite. Benaoaranoj ne sciis, kiuj tiuj feraj homoj estas, nek kion ili volas. Ili ja nur sciis, ke li ne volis strangulojn promenante laŭ Benaoarano, amata insulo sia. Ili vidis, ke tiuj homoj bruiĝas multe kiam ili paŝas, kaj ankaŭ siaj bestoj krias strange. Tiuj fihomoj mortigis iliajn zorge garditajn kaprojn, per bastonoj ege bruiĝantaj, kaj ili ne ŝatas ĝin. Ankaŭ la fihomoj perfortis paŝtistinojn kiun ili trovis tute sola.

Kion fari? Tanaŭsuo kaj la aliaj dek du reĝoj el la insulo kunvenis, kaj decidis, ke ili ne povas alproksimiĝi al la diabloj feraj sufiĉe por mortigi ilin —se eblas— per siaj tranĉiloj kaj bastonoj, kaj ankaŭ, ke ili estas tro altaj sur siaj bestoj bruiĝantaj. La sola solvo estas ĵeti ŝtonojn al la kapo, esperante mortigi ilin tiumaniere.

Dirite kaj farite: ili subeniris al loko super la diablejo, kaj elspezis provizon da ŝtonoj frakasante kapojn senkaskajn diablajn. Kiam ili finis sian provizon de ŝtonoj, vicoj da kamaradoj portis ĉene plian municion el la pinto de la monto. Finfine, kaj

ĉefe pro timo kaj malorganizo de la diabloj, kiuj tute ne sciis el kiu parto de la ĉielo venis tiu ŝtonpluvo, venko venis por la lokanoj: preskaŭ ĉiu diablo mortis, eskapante nur tri aŭ kvar inferaj estaĵoj, kiuj sukcese atingis siajn ŝipojn por, espereble, ne reveni dum siaj vivoj.

Se nia rakonto haltus ĉi tie, ĝi estus finfeliĉa rakonto. Bedaŭrinde, estas pli da diabloj en la mondo ol dezirite, kaj ili revenis. Kaj kiel! Ili revenis kvaroble, ili tromultiĝis, kaj la nova batalo estis pli akra. Tanaŭsuo gardis virinojn kaj infanojn en kaverno sekreta en la mezo de la insulo, kie tero subeniras kiel granda umbiliko. Virojn li ordonis supreniri al la plej alto de la insulo, kaj formi plilongajn vicojn por alporti ŝtonojn jeteblajn al la invadintoj. Ne mankus ŝtonoj, ĉar la insulo estis sindona ŝtone. Sed ŝajne la diabloj havis helpon de Dio: la montsupro malvarmiĝegis tiam, kaj multe da la defendantoj mortis pro malvarmo! Kiam Tanaŭsuo konstatis, ke ili estis senarmitaj antaŭ la diabloj, li kapitulacis kaj la diabloj malliberigis lin kaj sian popolon. Tiuj diabloj estis arĝentavidaj, ĉar ili disvendis lian popolon kiel sklavojn en Diablujo, kaj Benaaron, patrio jarmila de la raso de Tanaŭsuo, popolis la diabloj, kaj sekve nova lingvo, nova kulturo, novaj sintenoj reĝis la insulon. Ĉar ili ignoris la lingvon benaoaran, ili renomis la insulon, laŭ arbo tiuloka: La Palmo.

Kvin cent jaroj pasis, dum la praidoj de tiu diableska popolo multoblogis, kaj nun ili defendas, ke ili estas idoj de tiuj “gŭanĉoj”, kaj la nunajn *diablojn* ili nomas *gotoj* (kiuj fakte estis invadintaj Diablon multe jaroj antaŭ la diabloj invadis Benaaron), al kiu ili kulpigas pro mortigo kaj disvendo de *praavoj siaj*. Sed tiuj hodiaŭaj *gŭanĉoj* (raso kiu neniam vivis en Benaoarano) nekredeble farus tion, kion Tanaŭsuo faris: kiam oni portis lin ŝipe al Diableska Duoninsulo por prezenti al sia Diabla Moŝto la Reĝino, li rifuzis manĝi, ĝis li finfine mortis pro malsato, molntrante trajton benaoaran por libereco.

Tiu ĉi rakonto estu omaĝo al malnova Tanaŭsuo, kaj ankaŭ al liberecana sento kiujn ĉiuj, eĉ *ni diabloj* kaj duoninsulaj kaj insulaj, kaŝe havas je la fundo de nia koro!

Alfonso.

LA TAJFOREGNO DE MURCIA,

El *Lirikaĵ perloj de Al-Andalus*,

de Antonio Marco Botella



La tiamaj poetoj multe uzis la pomon por siaj metaforoj, komparante ĝin kun virinaj vangoj se ruĝaj, kaj kun doloroj kaj envio, se flavaj.

Abu Yafar Ahmad ibn Waddad, alnomita *al-Buqayra* (la bonvideto) kaj ankaŭ al-Mursi, t.e. la mursjano, verkis divanon, kie aperas, inter multaj aliaj, ĉi tiuj versoj, verŝajne verkitaj okaze de la decido de certa sinjoro lasi la poeton sen protekto kaj ekonomia helpo, kiun li ĝuis ĝis tiam:

*Ĉu ne estis mi birdeto
dediĉita per la kanto
laŭdi viajn eblajn virtojn
en konstanta glorekzalto?
Sed okazis kun surprizo
certan malfeliĉan tagon,
ke vi volis ja min lasi
sen la ombr' kaj protektado
de la malavaro via
kaj kun ĝi de via ŝato.
Se vi nun de mi elŝiris
mian logan belplumaron,
kiel povas min prikanti
viajn glorojn kaj virtfarojn?*

Abu Yafar Ahmad ibn Waddad forpasis en la jaro 1125.

Elstara kiel poeto, ĉar li verse verkis sian propran biografion kaj laŭdajn poemojn al siaj protektantoj, estis 'Ali ibn' Ahmad (laŭ aliaj aŭtoroj ibn Ismail), Abu-l-Hasan al-Mursi, pli konata per la nomo *Ibn Sida*, 'la blindulo', naskiĝinta en Mursjo ĉ. la jaro 1006. Li estis blinda, same kiel sia patro, kiu instruis lin

dum junaĝo, krom pri filologio, kiun la patro lertege mastris, ankaŭ pri bazaj sciencoj. Poste li kompletigis sian edukadon en Kordovo, kie li lernis aliajn intelektajn movadojn same el Oriento kiel el Okcidento. Jen fragmento el unu el liaj poemoj elvokantaj tiujn jarojn kaj mencianta grandan parton de liaj profesoroj, ĉiuj famaj en siaj respektivaj scio-fakoj:

*Kiam estis milkvarjara
jam mi legis la Koranon,
kaj ankoraŭ ne sesjara,
mi, parkere, sen eraroj,
recitadis longajn pecojn
el la libro' de islamanoj.
Jam talente mi dotita
per hermeneŭtik-kapablo
mi profitis de la scio
de klerul' el ĉiu kampo,
kaj kleriĝis mi amplekse
per scienco de Sallam-o**
la Abbas-aj opinioj**
kaj la Humaydi-a sago**
ĉion mi gravuris zorge
en l' intern' de mia kapo.
Kiam la kapabloj miaj
maturiĝis pri pensado
studis mi la grandajn majstrojn,
eksplikantojn de eraroj,
de religiaj duboj,
de la veroj de imanoj:
doktajn verkojn de Ibn Ishaq**
tre rigorajn pri Korano;
pri arabaj tradicioj
Talamanki sen rivalo;
ja Ubaydi la leksikojn***

Dairigota...

** Pro manko da loko, ni klarigos venonnumere

Kajeroj _____



_____ **el la Sudo**

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

**REDAKCIO: Poŝtkesto 4461,
E30080 MURCIA,
HISPANIO**

**Retskribu al
jesuo@mur.hnet.es**

<http://www.mur.hnet.es/uphm/jesuo/kajeroj.htm>

<http://www.dragonfire.net/~Esperanto/kajeroj.htm>



Anoncisto estas laboristo

Depósito legal: Z-2398-88

Presejo: Alegría.